

DUM JESUO PREĜIS LA ASPEKTO DE LIA VIZAĜO ALIĜIS – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk.9, 28-36

Kaj pasis post tiuj diroj ĉirkaŭ ok tagoj, kaj li prenis kun si Petron kaj Johanon kaj Jakobon, kaj supreniris sur la monton, por preĝi. Kaj dum li preĝis, la aspekto de lia vizaĝo aliĝis, kaj lia vestaro fariĝis blanka kaj fulme brilanta. Kaj jen interparolis kun li du viroj, kiuj estis Moseo kaj Elija, kiuj montriĝis en gloro, kaj parolis pri lia eliro kiun li estis plenumonta en Jeruzalemo.

Sed Petro, kaj tiuj, kiuj estis kun li, estis subpremataj de dormo; sed vekiĝinte, ili vidis lian gloron, kaj la du virojn, kiuj staris kun li.

Dum ili foriris de li, Petro diris al Jesuo: Majstro, estas bone por ni esti ĉi tie; kaj ni faru tri laŭbojn: unu por vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija; li ne sciis, kion li diras.

Kaj dum li tion diris, nubo venis kaj superombris ilin; kaj ili timis, kiam ili eniris en la nubon. Kaj el la nubo venis voĉo, diranta: Ĉi tiu estas Mia Filo, Mia elektito; lin aŭskultu.

Kaj tuj kiam la voĉo ĉesis paroli, Jesuo troviĝis sola. Kaj ili silentis, kaj al neniu en tiuj tagoj rakontis ion, kion ili vidis.

En la Evangelio de la pasinta semajno, la unua karesma dimanĉo, ni asertis ke la tentoj de Jesuo en la dezerto fare de la diablo ne estas limigita periodo de lia surtera vivo, sed ke lia tuta surtera vivo de Jesuo disvolviĝis sub la signo de tentoj, de delogoj flanke de skribistoj, de fariseoj, de la popolamaso, kaj ankaŭ flanke de liaj komunumanoj, de la disĉiplaro.

Tio estas kion la evangeliisto komunikas al ni per la epizodo kiun ni aŭdis hodiaŭ, la 9an ĉapitron de la Evangelio laŭ Sankta Luko, ĉe la versego 28.

“Post ĉirkaŭ ok tagoj”, la datado estas preciza. Okazis la unua anonco pri la Pasiono kaj la evangeliisto tuj evidentigas la efikojn de tiu Pasiono, de la morto de Jesuo kaj de lia resurekto. La nombro ok indikas la tagon de la Resurekto. Jesuo resurektis la unuan tagon de la semajno.

Kaj do la nombro ok indikas la vivon kiun la morto ne interrompas. “Post tiuj diroj”, ĝuste rilate al la anonco de la Pasiono, “Jesuo prenis kun si Petron kaj Johanon kaj Jakobon”, la tri disĉiplojn la plej nekontentigeblajn, tiujn kiuj tendencas esti ĉefoj de la grupo. “Kaj Li supreniris sur la monton”, tiu ne estas iu ajn monto, temas pri difinita monto, skribita kun apudmetita difina artikolo, ĝi estas konata monto.

Kio estas tiu monto? Ĝi estas la monto de la dia sfero. Do, Jesuo prezentas al ili sian dian kondiĉon. “Por preĝi”, estas apartaĵo de Sankta Luko la fakto ke la gravaj aŭ malfacilaj momentoj en la vivo de Jesuo estas ritmataj de tiu preĝado. Nu, “dum li preĝis, la aspekto de lia vizaĝo aliĝis, kaj lia

vestaro fariĝis blanka kaj fulme brilanta”, fulme brilanta kiel la du viroj kiuj anoncos al la virinoj lian resurekton, kiuj diros al la virinoj: “kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj?”

Do, Jesuo montras kia estas la kondiĉo de homo trapasinta la morton. Ĝi ne lin malgrandigas, sed lin plifortigas. “Kaj jen”, la evangeliisto raportas al ni surprizon, “du viroj”, ĝuste kiel la du anoncantaj la resurekton, “interparolis kun li”.

Ili interparolas nek kun Petro, nek kun Jakobo, nek kun Johano. Kaj kiuj estas ili? Ili estas Moseo, la granda leĝdonanto, kaj Elija, la granda profeto, tio kion ni nomas la Malnova Testamento, dividite en la partojn de la leĝo kaj de la profetoj “kiuj montriĝis en gloro, kaj parolis pri lia eliro” - Sankta Luko estas la evangeliisto kiu vidas la itineron de Jesuo kiel eliron - “kiun li estis plenumonta en Jeruzalemo”.

La deklaro farita de la evangeliisto estas drama. Jeruzalemo, la sankta urbo, nun fariĝis malliberejo, ĝuste kiel Egiptujo, kaj kiel Moseo devis forkonduki la hebrean popolon de la egipta sklaveco, tiel same Jesuo devas forkonduki la izraelan popolon de la sklaveco de la sacerdota kaj religia klaso kiu en Jeruzalemo tenis lian povon.

“Petro, kaj tiuj, kiuj estis kun li, estis subpremataj de dormo”, tio signifas ke ili ne aŭskultas, ne sekvas kaj ke ili ĉiukaze ne solidaras kun Jesuo. La saman scenon ni retrovos en la momento de la Pasiono, kiam Jesuo sur la monto Olivarba komencos preĝi kaj ankaŭ tiam la disĉiploj estos subpremataj de dormo; tio signifas miskomprenon pri tio kion Jesuo estas diranta.

“Sed vekiĝinte, ili vidis lian gloron, kaj la du virojn, kiuj staris kun li. Dum ili foriris de li”, jen la momento estas drama, Moseo kaj Elija, tiuj kiuj naskas konfidon en la grupo, nome, la leĝo kaj la profetoj “foriris de li”, jen Petro kiu rolas kiel la diablo, kiel tentanto, li estas prezentata nur per sia negativa kromnomo, kaj dum li klopodas malhelpi tiun foriron.

“Petro diris al Jesuo: “Estro”, ne ‘Majstro’ kiel ĉi tie estas tradukita la grekan vorton Epistata (ἐπιστάτα), kiu signifas “ĉefo, mastro”, por indiki “Majstron” la evangeliistoj uzas Didaskalos (διδάσκαλος), do “estro” komprenigas kian ideon pri submetado li havis rilate al Jesuo. “Estas bone por ni esti ĉi tie. Ni faru tri laŭbojn”. Kial laŭboj? Estis festo en Izraelo, ĝi estis tiel grava ke ĝi ne bezonis esti nomata, simple oni nomis ĝin “la festo”

Kiu estis tiu festotago? Ĝi estis la festo nomata Sukoto kaj rememoris la liberigon de la egipta sklaveco, kaj dum unu semajno oni vivis sub laŭboj. Laŭ antikva tradicio oni opiniis ke, kiel dum la malnova liberigo oni vivis sub laŭboj, vivante sub laŭboj dum tiu periodo, dum tiu ĉi festo, manifestiĝos la liberiganta mesio. Do, Petro invitas Jesuon esti la atendita mesio laŭ la tradicio. Jen kial fari tri laŭbojn.

Sed atentu la vicon, “unu por vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija”. Kiam ĉeestas tri roluloj la plej grava el ili estas ĉiam meze de ili, nu, meze, por Petro ne estas Jesuo sed Moseo, kiu donas la certecon de la leĝo, kaj Jesuo estas tute aparte kiel Elija. Meze estas la leĝo, poste venas la profetoj, kaj post ili estas Jesuo.

Kion Petro celas diri estas: “Jen la mesio kiun mi volas. Temas pri mesio kiu gvidu la popolamason al plenumo de la leĝo, kaj ke tion li faru per la profeta kaj violenta fervoro de Elija”, kaj la evangeliisto komentas: “Kaj li ne sciis, kion li diras”.

“Dum li tion diris, nubo venis”, ĝi estas la simbolo de la dia agado, “ĝi superombris ilin. Kaj ili timis, kiam ili eniris en la nubon”, estas timo pro la dia manifestiĝo. “Kaj el la nubo venis voĉo,

diranta: Ĉi tiu estas Mia Filo”, ‘filo’ signifas ne nur tiu kiu naskiĝis, sed ankaŭ tiu kiu similas, “Mia elektito”, kaj poste la verbo estas en la imperativa formo: “lin aŭskultu!”, vi devas aŭskulti nek Moseon nek Elijan, estas Li kiun vi devas aŭskulti.

Kaj tuj kiam la voĉo ĉesis paroli, Jesuo troviĝis sola. Kaj ili silentis”, tiu silento estas negativa. Ili silentas kiel faras la kontraŭuloj de Jesuo, pli poste, ĉe la 20a ĉapitro, ni trovos la evangeliiston kiu skribas: “Kaj ili ne povis ekkapti la diron antaŭ la popolo; kaj ili miris pro lia respondo, kaj silentis”.

La silento signifas ke ili ne konsentas kun la eventoj. “Kaj en tiuj tagoj ili nenion rakontis”, la evangeliisto uzas la verbon ‘anonci’, ili estis vokitaj por anonci tiun realaĵon kiu kapablis venki la morton, sed ili silentas, “ili al neniuj en tiuj tagoj rakontis ion, kion ili vidis.”

Ili ne konsentas kun tiu nova realaĵo kiu estas Jesuo kiun oni devas aŭskulti. Moseo kaj Elija nur rilatas al Jesuo, sed ili ne plu estas universalaĵoj kiuj gvidas la vivon de la kredantoj.